La gestudentoj batalantaj por publika kaj kvalita universitato, enfermiĝinte en la ĉefkonstruaĵo de la Barcelona Universitato – *la Centra* – (ĉe Plaça Universitat), alvokas al solidareco kaj apogo ĉiujn sociajn movadojn, anarojn, asociojn, genajbarojn, individuojn, ktp. per la subskribo de la manifesto (ĉi-kuna) kaj aktiva partopreno de ĉiuj agadoj de nia alternativa universitato. Ni estas konvinkitaj, ke nia batalo estas via.

Kiel partopreni:

- Proponante agadojn por nia alternativa universitato. (vidu la kontaktan ret-adreson)
- Translokante viajn agadojn, asembleojn, laborkunvenojn, ktp. al la okupata universitato. (ni posedas la tutan necesan spacon)
- Partoprenante la aranĝojn, kiuj okazas ĉi tie (http://www.tancadaalacentral.blogspot.com)
- Se vi disponas je tempo kaj energio, venante dormi kun la gebatalantoj enfermiĝintaj en la universitato (estas abunda manĝaĵo, kaj bona kaj respektoplena estoso!)
- Sendante al ni ĉiujn dokumentojn (grafikaĵojn, skribaĵojn, retligojn...) rilatajn al la enfermiĝado kaj la batalo kontraŭ la Eŭropa Spaco de Supera Eduko.
- Disvastigante ĉion okazantan, por ke nia afero kiel eble plej diskoniĝu.

SE NI VENKAS EN TIU BATALANO, NI ĈIUJ VENKAS!
NI ĈESIGAS LA LERNADON POR POVI LERNI!!

Resumo de la depostuloj:

Pro ĉio ĉi ni petas la subtenon al la studenta batalo por sukcesi la plenumon de la tri sekvaj punktoj:

- Komenciĝu vasta debat-procezo, publika kaj malferma, en kiu partoprenu larĝaj socialaj agentoj por difini, kia estas la modelo de publika universitato, kiun bezonas kaj volas la kataluna socio, same kiel la ekonomiajn rimedojn je kiuj oni disponos por garantii publikan kaj kvalitan universitaton.
- Nuligo de la universitataj kaj juĝejaj proces-enketoj kontraŭ la 31 gebatalantoj de la Barcelona Aŭtonoma Universitato (UAB) imputitaj pro sia defendado de la publika universitato.
- La efektivigo de referendumoj en ĉiuj publikaj universitatoj, por ke la universitata komunumo alprenu starpunkton pri la procezo de aplikado de la Eŭropa Spaco de Supra Eduko.

POR SUBSKRIBI LA MANIFESTON
http://www.firmasonline.com/1Firmas/prefirm.asp?C=1973

POR KONTAKTI NIN KAJ SENDI ĈIAN DOKUMENTON:
tancadaalacentral@gmail.com